

TEA-BULTENO

14ª JARO **MARTO - APRILO 2011** **NUMEROJ 3-4**

Parolkapablo igas la homon libera. Kiu ne scias sin esprimi, estas sklavo.
Ludwig Feuerbach (germana filozofo k antropologo 1804-1872)

Ĝenerala Jarasembleo

la 20an de februaro 2011

Prezidanta kaj sekretaria raportoj

Estimataj Asocianoj, karaj geamikoj, ankoraŭfoje ni renkontiĝas por la jara asembleo de nia Asocio. Estas bone, ĉu ne? Tio signifas, ke ni persone fartas sufiĉe bone kaj ke nia grupo vivas.

Mi diris "*vivas*", kvankam mi dezirus diri "*prosperas*" kaj tio ververe ne okazas. Nia TEA, jam 105-jaraĝa, vivas, vivetas, sed ne prosperas kiel ĝi povus kaj devus. Nia agado estas sufiĉe abunda malgraŭ ĉio, ni konstante ion entreprenas, eĉ sukcese, sed la grupo ne kreskas. Mankas la bezonataj fortoj por vigle daŭrigi agadon, la nombro de aktivaj membroj estas tre malalta, ĉiam la samaj personoj laboras por realigado de la projektoj elpensitaj. TEA bezonas renovigon! Ne nur en la "branĉo" aktivuloj – kiu estas la plej grava, sed ankaŭ en la branĉo "labormetodoj".

La jaro 2009 montris, ke ni kapablas realigi sukcesajn aranĝojn altnivelajn: mi nur menciias la kongreson de la esperantistaj fervojistoj kun partopreno de pli-malpli 300 personoj, kaj poste la Ekspozicion kaj Seminarion okaze de la datreveno de Zamenhof. Estis deziro publikigi la tekstojn de la Seminario kaj Ekspozicio: la laboro pri kopiado de tekstoj en la itala kun la oportuna traduko esperanten estis komencita, sed ni ne sukcesis ĝin fini kaj sekve la tuto kuŝas ie, atendante taŭgan momenton por kompletigo. Kaj kompreneble inter tiuj du gravaj aranĝoj ĉiam ni zorgis pri klubaj programoj …

La tuto postulis multegan laboron kaj certe lacigis nin ĉiujn kaj pro tio ni opiniis, ke la jaro 2010 estu iom pli trankvila por permesi bele fini la 2009an laboron.

Tio ankaŭ ne okazis. Jes, ni estis pli trankvilaj, faris iom malpli, sed vi mem povos juĝi laŭ la raporto de nia senlaca Sekretariino. Finfine ni sufiĉe multe laboris ankaŭ en la pasinta jaro!

Ĉefa realigado estis la 4ª Internacia Konkurso KRISTNASKO KUNE, sub la temo "*Kristnaska poezio*". En ĝi partoprenis 542 laboraĵoj (desegnaĵoj, poeziaĵoj, manfaritaĵoj) de geknaboj el 12 landoj, plej multnombre el Bulgario, mi dirus *amase*, kaj sekve el Kroatio. La ekspozicio okazis en la Komerca Centro *Il Giulia* kaj la inaŭguron partoprenis la Skabeno pri Kulturo de la Triesta Komunumo kaj televida skipo de ORF2 - Karintio, kiu filmis kaj elsendis en la programo de la 8ª de januaro nomita "*Servus, srećno, ciao*", kiun vi povos poste ĝui. La aranĝo estis sukcesa, sed pri detaloj vi aŭdos poste.

Ni ne forgesu pri "Karstaj tagoj", interesaj laŭ diversaj vidpunktoj, sed en kiuj ne multaj inter niaj membroj partoprenis.

Dum la jaro 2010 ni kunlaboris kun aliaj kulturaj lokaj asocioj, kaj multe pli povus okazi, se ni havus la fortojn por tion fari, kaj krome nia kutima agado pludaŭris. Estas interese, ke la horar-ŝanĝon en mardoj, nun de la 17ª ĝis la 19ª horo, oni sufiĉe ŝatis kaj tio povos fruktodone daŭri.

En la kursoj ni havas iom da junularo, kiu esperigas nin por la estonto. Imagu kiel bone, se oni sukcesus starigi "junularan grupon" kiel TEA havis antaŭ 50 jaroj! Tio kompreneble estas revo, sed, se oni povus intense agadi en junularaj medioj, kial tiu revo ne fariĝu realaĵo?

Ankaŭ ĉijare mi diras, ke, per niaj modestaj fortoj, ni sukcesis en io, kio ofte ne sukcesas en pli nombraj kaj fortaj esperantistaj organizoj. Oni povus fari multon pli, tutcerte, se la aktivaj membroj estus pli nombraj, se tiuj estus junaj homoj kun novaj ideoj kaj proponoj. Kio plej mankas al ni? Instruistoj, unue. Efika informkampanjo pri kursoj, due. Certe ne mankas al ni projektoj tute realigeblaj: nia fantazio estas vasta.

Kiel ofte mi diris, niaj vicoj reduktiĝas pro diversaj kialoj: aĝo, sano, aliaj okupoj. Vizito de niaj kunvenoj estas ege utila por la asocia vivo, por flegi kontaktojn, por interŝanĝo de ideoj kaj preparo de projektoj, kaj absolute necesaj por lingva ekzercado. Ĉu tiuj vizitoj fariĝis malpli allogaj? Se jes, bonvolu proponi, sugesti, kaj poste partopreni. Se vi povas, volas, deziras kunlabori, anoncu vin, partoprenu niajn semajnajn kunvenojn, helpu nin plilarĝigi la membraron kaj renovigi la gvidorganojn. Hodiaŭ, vi havos tiun ĉi eblecon.

En la antaŭa jarkunveno, mi vokis al kunlaboro kaj al renovigo favore al novaj elpaŝoj kaj sukcesoj. Denove mi tion faras, ĉar maltrankvilo pri la estonto sentiĝas. Se ĉiu el ni disponigos al TEA iom da tempo kaj entuziasmo, kredu, ni povus realigi multon kaj dank' al tio ebligi al novaj generacioj celebri la 200an datrevenon de la fondiĝo de nia asocio.

Vivu TEA kaj Esperanto!

Edvige Ackermann

Tre estimataj TEA-anoj!

2010ª jaro jam estas for kaj ĉi tie ni kunvenas por taksi kaj precipe memorigi la paŝojn faritajn de nia Asocio en ĵus finiĝinta jaro. Kompare kun 2009, la pasinta jaro ne estis tiom eventoriĉa, tamen tio tute ne signifas, ke oni malaktivadis.

Ni komencu preskaŭ kronologian trarigardon pri la agado de TEA, unue pri tiu eksterklubeja.

☆ **29/05 – 1/06** - **Printempaj Karstaj Tagoj**: ne amasa partopreno, sed taŭga por bona funkciado kaj – kio plej gravis – ĉiuj estis tre kontentaj pri la aranĝo. Okazis promenadoj en Karsto, vizito de Didaktika NaturCentro en *Basovizza*, manĝoj en tipaj karstaj restoracioj ks. En tiu organizado kaj planado gravan helpon donis Edvino Vatta, kiu aparte estas dankinda. Sekve de la kontaktoj kun la direktoro de la Centro Diego Masiello, la inform-broŝuro pri la Centro nun ekzistas ankaŭ en esperanta versio: ĝi troveblas inter la alilingvaj broŝuroj. Nia Asocio krome eldonis, propagandcele, 300 poŝtkartojn pri Karstaj Tagoj, kun bela bildaro.



☆ **26an de aŭgusto** - enkadre de **Someraj Karstaj Tagoj**, alvenis al Triesto 35 esperantistoj, el proksimume 17 diversaj landoj, partoprenintaj la 77an Italan Esperanto-Kongreson en *Lignano Sabbiadoro*. Oni vizitis la NaturCentron en *Basovizza*, kies direktoro prezentis filmon pri Karsto kaj gvidis la viziton, la Nigran Groton, helpe de anoj de la Speleologia Grupo *San Giusto* kaj fine de *San Lorenzo* oni iris al Valo Rozandra, akompane de prof-ro Elio Polli, kiu klarigis pri flaŭro kaj geologio de tiu unika Karsta teritorio. La tagĵurnalo *Il Piccolo* publikigis artikoleton kun foto pri la okazaĵo. Al ĉiuj ekskursantoj estis disdonitaj koloraj, 10-paĝaj, inform-libretoj pri Triesta Karsto, tiuokaze preparitaj.

☆ **29an de aŭgusto** - Tiutage, la evento ne estis organizita de TEA mem, ĝi nur partoprenis, sed gravas mencii ankaŭ tiun ĉi, ĉar temas pri kunlaborado kun alia kultura asocio kaj sinprezento al ekstera publiko, kio helpas nian diskonatiĝon. Zorge de prof-ino Gabriella Valera Gruber, prezidanto de la Asocio „Poezio kaj Solidareco", okazis en la Ĝardeno de la Multkultura Centro *„Arca dei Colori*" legado de poeziaĵoj el la kulturaj tradicioj greka, rusa, kroata, slovena, ĉeĥa, germana kaj ankaŭ esperanta. Multnombra publiko ĉeestis kaj aŭskultis la deklamadon. Esperantistoj legis versaĵojn de Umberto Saba kaj de Lina Gabrielli, esperante kaj itale, plus unu en la triesta dialekto.

☆ **Aŭtunaj Karstaj Tagoj** okazis iom pli modeste, inter oktobro kaj novembro, precipe pro tre stranga vetero, tute malkuraĝiga.

☆ **decembre - Kristnasko Kune - 4ª Internacia Konkurso pri la temo "Kristnaska Poezio".** Jam la kvaran fojon estis lanĉita ĉi tiu konkurso, adresita al geknaboj ekde 6 ĝis 14 jaroj, kies verkoj (desegnaĵoj, poeziaĵoj kaj/aŭ manfaritaĵoj) devis atingi nin antaŭ la duono de novembro. En la pasintjaraj konkursoj averaĝe partoprenis ĉirkaŭ 100-120 geknaboj. Ĉi-foje temis pri vere ekster-ordinara inundo da ellaboraĵoj: fakte alvenis **542 verkoj** el **12** diversaj landoj (Belgio, Bosnio k. Hercegovino, Brazilo, Bulgario, Ĉeĥio, Francio, Italio, Kroatio, Litovio, Rumanio, Ruando, Vjetnamio). El Bulgario ni ricevis la plej grandan kvanton: entute 357. Duavice estis Kroatio, el kiu venis 110 verkoj. Valora estis la kunlaboro de s-inoj Galja Nikolova el Bulgario kaj Maria Beloŝević el Kroatio, kiuj vaste propagandis la konkurson tra siaj landoj. Jam en novembro oni komencis labori por pretigi la ekspozicion, kiu estis prezentita de la 6ª ĝis la 20ª de decembro en la Komerca Centro *„Il Giulia*". Pluraj helpis kaj dum la preparado de la paneloj kaj dum la muntado en la ekspoziciejo: multajn laborhorojn postulis precipe la aranĝo de la desegnaĵoj, kaj tial vere dankindas tiuj kiuj metis sin je dispono por tion fari: aparte menciendas s-inoj Amalia kaj Elena Zerpini. En la periodo, dum kiu viziteblis la eksponitaj ellaboraĵoj, kelkajn posttagmezajn horojn asocianoj deĵoris en la Komerca Centro, kaj por disdoni propagandilojn kaj ĉefe por inviti la vizitantojn voĉdoni la preferatan verkon. La inaŭguron, je la 6ª de decembro, ĉeestis la komunuma skabeno pri kulturo Massimo Greco kaj televida teamo el Karintio, ORF 2, kiu longdaŭre filmis kaj intervjuis. Artikolo kun fotoj poste videblis enrete. Sabaton la 11an la virinvoĉa Ĥoro „Ivan Grbec", estrita de s-ino Marjetka Popovski, prezentis en la Komerca Centro kelkajn kristnaskajn kantojn en esperanta, itala kaj slovena lingvoj. Enkadre de „Kristnasko Kune" estis organizita, **mardon la 14an de decembro, koncerto** ĉe Salono Beethoven. La tre konata M° Severino Zannerini gvidis, verve kaj vigle, la Ĥoron „Lions Singer's": bedaŭrinde, malgraŭ sufiĉa disvastigado de la okazaĵo, malmultis la aŭskultantaro. La koncerto estis farita ankaŭ kun bonfara celo favore al la Orfejo en Goma, RD Kongo, kies estro estas la esperantisto Jean Paul Alexis, kiu estis subtenata, dum multaj jaroj, de pastro Duilio Magnani, bedaŭrinde pasintjare mortinta. Dum - kaj plurajn tagojn post - la koncerto estis farita monkolekto: oni entute ricevis 250 eŭrojn, kiuj jam estas transdonitaj al la Orfejo en Goma.

Kaj nun pri la rutinaj **klubaj programoj:** ĉiam pli malmultaj asocianoj partoprenas en la vendredaj programoj. Ne estas sekretaria tasko enketi, kial tio okazas: pluraj povas esti la kialoj, inter kiuj – ne certe la plej malgrava – la malmulta allogeco de la programeroj. Ĉiel, tamen, ni klopodis ion plani, por iel altiri la interesiĝon de TEA-anoj. Oni povis spekti filmojn pri la Itala Kongreso en Cassino, UEA, Bjalistoko, Mongolio, kaj ankaŭ fotojn pri Maroko kaj denove pri Mongolio; estis legitaj italaj kaj esperantaj poeziaĵoj; fojfoje oni krucvortumis, kaj iam oni ĝuis vere profesie faritan E-filmon „Dek Tagoj de Kapitano Postnikov", en kiu monologas Saŝa Pilipović. En aprilo estis gasto de TEA la eksa Honor-Konsulo de Mongolio, d-ro Aldo Colleoni, kiu parolis al klubanoj pri tiu lando.

Esperantistaj gastoj en Triesto: dum la jaro vizitis nin Elda kaj Alessandro Corrado el Brescia, Folkmar Koller el Vieno, Marija Beloŝević el Zagreb,

Zdenka Rojc el Maribor, Eŭgeno de Zilah el Francio, Didier Izacard el Düsseldorf, Elisabeth kaj Mats Gröning el Stokholmo.

Tradiciaj festoj: SIA - 26-28 februaro – El eksterlando venis s-roj Folkmar Koller kaj Françoise Stride. Vendrede vespere, okazis projekciado de bildoj pri Triesto kaj triestanoj; sabate, vizito de Poŝta Muzeo, tagmanĝo ĉe TEA kaj gitarludado de Françoise; dimanĉe, ĉiuj al Muggia, perboate, por interesa ĉiĉeronado tra la urbeto fare de Danilo kaj Maria Grazia Gerbec kaj bongusta tagmanĝo ĉe Elena. Tre bela internacia amikeca kunestado!

Pri kongresoj/konferencoj. Kelkaj TEA-anoj ĉeestis junie la 6an Azian Kongreson en Ulan Batoro, Mongolio; julie, la UK-on en Havano, Kubo, kaj, septembre, la kutiman „Feston de Amikeco" sur Monto *Forno* apud *Arnoldstein*.

En Triesto - Muzeaj vizitoj kaj ekskursoj – Pasintjare ni komencis organizi vizitojn al muzeoj kaj ekskursojn por triestanoj. Tio bone sukcesis, tre volonte nia membraro partoprenis la diversajn okazaĵojn. Estis vizititaj: Apoteka Muzeo *Picciola*; Fervoja Muzeo en *Campo Marzio* kaj ekspozicio pri triestaj tramoj (pri ĉi vizito, la tagĵurnalo *Il Piccolo* publikigis artikoleton kun foto – ankaŭ tio estas propagando!); Ŝtongravuraĵa Ĝardeno; Botanika ĝardeno *Muzio de' Tommasini*; Muzeo *Scaramangà* (aparte tre interesa!); Mezeŭropa Poŝta kaj Telegrafa Muzeo kaj ekspozicio pri hundoj laborintaj en la sanitara servo de aŭstra-hungara armeo. Oni ekskursis en la arbaro *Tommasini*, de *Prosecco* al Miramar' kaj laŭ padoj Natura kaj de la Salvio.

Pri ekstera informado

25 majo – Edvige Ackermann kaj d-ro Aldo Colleoni estis gastoj de TELE4, enkadre de la rubriko "El la kofro de l' tempo" (Il baule del tempo), kaj la ĵurnalisto Facchinetti intervjuis ambaŭon pri Mongolio.

Kiel kutime **anoncoj/informoj** pri kursoj, programoj, aranĝoj en Triesto kaj aliloke estis senditaj dum la tuta jaro al radioj kaj lokaj ĵurnaloj.

Alirprogramoj de RADIO UNO: daŭras la partopreno de TEA en la alirprogramoj de RAI. Dum la jaro okazis entute 7 elsendoj, pri diversaj temoj esperantaj.

Ĝeneralaj asociaj informoj:

Daŭre la asocianoj ricevas, aŭ rete aŭ perpoŝte, ĉiun duan monaton, TEA-Bultenon, kiun espereble almenaŭ kelkaj legas.

Estrarkunsidoj: en la jaro oni kunsidis 4 fojojn.

Korespondado: en papera versio estis ricevitaj 25 kaj senditaj 35 leteroj, kiuj troviĝas en siaj apartaj ujoj pri „Korespondado 2010". Sed jam de jaroj precipa korespondado okazas rete, kio estas pli rapida kaj povas atingi eĉ multajn personojn samtempe. Mi kalkulis, ke, proksimume, temas pri 500, inter ricevitaj kaj senditaj, retmesaĝoj, sed en tiun nombradon ne eniras tiuj korespondaĵoj, ekzemple, pri forsendo, ĉiun duan monaton, de TEA-Bulteno aŭ aliaj plurfoje ripetitaj. Ĉiuj korespondaĵoj el nepapera versio estas enmetitaj en kompaktaj diskoj, kaj povas esti kiam ajn konsultataj. En aparta ujo troviĝas ĉio koncernanta la 4-an Internacian Konkurson Kristnaskan: lavango da mesaĝoj estis interŝanĝitaj tiuokaze kaj, fine, 53 pakaĵoj, entenantaj la diplomojn kaj premiojn, estis senditaj al partoprenintoj en la konkurso.

Diversaĵoj:

TEA eksiĝis kiel membro de Hejmo pri Literaturo (*Casa della Letteratura*).

La 3an de septembro, vizitis nin Paola Buffa, universitata studentino de la fakultato "Internaciaj Sciencoj pri komunikado", preparanta disertacion por sia diplomiĝo, kies temo estas "Esperanto kiel diplomatia lingvo". Ŝi kontaktis nin por ricevi kelkajn informojn kaj sugestojn.

Du membroj de TEA (Doerfler kaj Valle) faris en oktobro kurson pri "Vidkomunikado kaj komputila grafiko", organizitan de la regiona Centro de Volontula Servo.

Estis tradukita esperanten la ttt-ejo pri Internacia Konkurso pri Poezio, aranĝita de la Asocio "Poezio kaj Solidareco", estrata de prof-ino Gabriella Valera Gruber, kiun ŝi ĉiujare organizas, kaj en kiu ofte partoprenis ankaŭ esperantistoj. Ĝi aperas rete ĉe www.castellodiduinopoesia.it.

Ankaŭ ĉijare la UEA-Fondaĵo „Biblioteko Roma kaj Paul Thorsen" donacis al TEA-Biblioteko kvanton da libroj respondaj al 100-eŭra sumo: laŭ nia peto, ni ricevis 8 librojn de la serio "Ludovikologia dokumentaro", eldonitajn de Ludovikito. Granda historia valoraĵo, leginda kaj legenda!

Dankon pro la pacienca aŭskultado.

Elda Doerfler




Ankaŭ ĉijare Triesta Esperanto-Asocio proponas al vi belan, unikan, tutesperantan sed absolute tut-triestan, restadon en la ĉemara ĉefurbo de regiono Friulo Julia Venetio. En la elektita periodo, **de la 2ª ĝis la 5ª de junio**, kiam naturo sin prezentas en sia plej admirinda vesto, temperaturo estas ankoraŭ milda, ni diru, eĉ perfekta por ĝui promenadojn en karsta teritorio, por tagmanĝi subĉiele ĉe la tipaj surmontetaj restoracietoj, por kunestadi ĝis vesperiĝo, spirante puran aeron ... nu, ja ĝuste en tiu ĉi speciala momento, ni atendas vin! Ĉu vi ne estas scivolemaj malkovri la triestajn belaĵojn? Se jes, ni varme vin invitas partopreni en la Karstaj Tagoj, por kune pasigi kelkajn tagojn. Se vi ŝatus plilongigi vian restadon, bonvolu sciigi tiun vian deziron al la organizantoj: ni klopodos vin kontentigi, ĉar, en kiu ajn momento de la jaro, ni organizas turismajn aranĝojn en Triesto kaj ties provinco, por grupoj de minimume 4 personoj ĝis 15, por familioj kun infanoj, por junuloj kaj plenkreskuloj! Provizora programo antaŭvidas: ekskursojn de *San Lorenzo* al Valo Rozandra; promenadojn laŭ la padoj de la Naturo kaj de la Salvio; suprengrimpadon sur la montetojn *San Leonardo* kaj *Lanaro*, kaj, kompreneble, ne mankos ĉiĉeronado tra la urbo. Petu pliajn informojn, skribante al Triesta Esperanto-Asocio (vidu pĝ. 5ª) aŭ, rete, al jenaj adresoj:

nored@tiscali.it; testudo.ts@gmail.com

Laste trovitaj!

Pluas la publikigo de karikaturoj, faritaj de grafikisto Jean Robert, pri famaj kaj elstaraj pioniroj de nia movado. Bonas rememori tiujn homojn, kiuj eminente kaj senlace laboris por disvastigadi nian komunan lingvon. Ĉi-foje temas pri



René de SAUSSURE (1868, Ĝenevo – 1943, Berno) estis svisa esperantisto kaj profesia matematikisto. Li skribis gravajn verkojn pri Esperanto kaj kunlaboris kun multaj E-ĵurnaloj. Lia ĉefa verko estis analizo pri la logiko de vortfarado de Esperanto ("Fundamentaj reguloj de la vortteorio en Esperanto"), defendanta la internacian lingvon kontraŭ kelkaj Idistaj kritikoj. Grava estis lia principo de Neceso kaj Sufiĉo[1] per kiu li kontraŭstaris la kritikon de Louis Couturat, ke Esperanto ne kongruas kun la principo de Renversebleco.

Li estis frato de Ferdinand de Saussure, fama kreinto de moderna lingvistiko. Eble pro lia influo, Ferdinand enmetis neŭtran mencion pri Esperanto en sian libron "Kurso pri Ĝenerala Lingvistiko" (1913).

En 1907 li proponis la adopton de spesmilo[2] kaj prenis sur sin la redaktadon de Internacia Scienca Revuo, kiu, danke al li, bonege prosperis kaj pliampleksiĝis. Sed Saussure, skribante sub la pseŭdonimo Antido, pli kaj pli komencis uzi la gazeton por diskuti reformojn en Esperanto. En 1919 aŭ 1920, la nova lingvo Antido jam estis preta, sed ankoraŭ en 1921 li mem konsideris ĝin nur "dialekto" de Esperanto. Pluajn aliajn projektojn tamen li intertempe eksperimentis, inter kiuj konataj estas Antido II, Lingvo Kosmopolita, Esperantido kaj, fine, Nov-Esperanto.

La 1an de septembro 1925, Saussure komunikis per cirkulero, ke li ĉesas nomi sin esperantisto, ke li forlasas "la esperantan standardon kun verda stelo sur blanka fono" kaj levas la standardon de Nov-Esperanto kun blanka stelo sur verda fono.

Antido estis lingvoprojekto pli proksima al "ortodoksa" Esperanto ol Ido. Li proponis ŝanĝon en ortografio kaj korelativa sistemo, foreston de akuzativo kaj kelkajn aferojn malpli gravajn en la vortprovizo. Pro tiu "herezo" li estis forigita el la Akademio de Esperanto kaj samtempe ankaŭ rifuzita de Idistoj: je la fino li restis izolita.

Sed indas tamen rememori lian figuron tra la rimaj vortoj de K. Kalocsay, kiu tiel bele lin pentris en sia poemaro "Rimportretoj - *Galerio de esperantaj steloj*", eldone de Literatura Mondo, Budapest, 1931.

Saussure, - la pura, klara Mens',
La projektinto, projektonto
Trabrilis, kvazaŭ lumofonto,
La vortstrukturon lia Lens'.

Ascendis el vort-arba dens',
Kiel la av' al Blanka Monto,
Saussure, - la pura, klara Mens',
La projektinto, projektonto.

Ne senmerita la incens'!
Al tre nebula horizonto
Pluiris li, sed post renkonto
La nia restis lia Pens'.

Saussure, - la pura, klara Mens'.

[1] **Neceso kaj sufiĉo**. La teksto de la fama principo, proponita originale de René de Saussure kaj aperinta unue en la Oficiala Gazeto (majo 1913), estas la jena:

"La Akademio rekomendas al la E-istaj aŭtoroj, ke ili sekvu la du jenajn principojn, kiuj kontraŭstaras unu la alian kaj estas la logika bazo de vortfarado en Esperanto:

a) Principo de neceso: en konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, sufiksojn, prefiksojn kaj finiĝojn necesajn por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentotan de tiu vorto;

b) Principo de sufiĉo: se la ideo tiamaniere esprimita estas jam bone kaj nekonfuzeble komprenata el la kunteksto sen iu el la sufiksoj uzitaj, tiu ĉi sufikso povas esti elĵetata kiel neutila kaj nenecesa."

La originala teksto de Saussure jenas:

b) Principo de sufiĉo: oni ne devas senutile ripeti dufoje la saman ideon en la sama vorto kaj oni ne devas enkonduki en la vorton fremdajn ideojn ne entenatajn en la ideo esprimita."

En unu frazo oni povus resumi la Principon jene:

„Oni enkonduku en vorton ĉiujn elementojn, kiuj necesas, sed ne pli ol kiom sufiĉas por la klara kaj plena elvoko de la ideo esprimita."

[2] **Kio estis Spesmilo?** (Sm) René de Saussure, notinte la abonprezojn de E-gazetoj el diversaj landoj, metitajn en plej malsamaj naciaj valutoj, elpensis manieron por forigi tiun problemon. Sian projekton li prezentis al la Franca Asocio por Progresigo de Sciencoj, kaj ĝin publikigis en la Internacia Scienca Revuo, maje 1907. En aŭgusto samjara la kongreso de tiu Franca Asocio rekomendis al la Esperanto-Asocioj la kreon de universala pagilo, ĉar "universala pagosistemo necesas pli kaj pli, kaj povas esti tre utila." Tiu ĉi lia ideo estis plene aprobita ankaŭ de Zamenhof mem, kiu, en sia letero adresita al prof-ro René, tiel esprimis sian kontenton: "Vian ideon mi ne sole aprobas, sed mi tre petas vin, ke vi neniam ĝin forlasu kaj ke vi nepre faru ĉion, kion vi povas, por ricevi por ĝi la sankcion de la Kembriĝa Kongreso. ... Ne forĵetu vian ideon ĉar pli aŭ malpli frue ĝi nepre venkos...".

En la proponita monosistemo, kiel baza unuo, estis **Speso** kaj, por la praktika uzado, **Spesmilo**.

1 Spesmilo estis egala al 0,733 gramoj aŭ 0,02356 francaj uncoj da pura oro, duondolaro, unu rublo, 2,50 svisaj frankoj ktp.

Pri spesmilo kaj speso, troviĝas pluraj proverboj en la Proverbaro Esperanta de L. L. Zamenhof, inter ili: "*Fremda spesmilo estas sen utilo*" kaj "*Spesmilo superflua poŝon ne ŝiras*".

... kaj kio estis Ĉekbanko Esperantista?

La **Ĉekbanko Esperantista** estis banko fondita en 1907 de Herbert F. Höveler (pseŭdonimo E. Ĉefeĉ –

daŭrigo je pĝ. 5ª



Esperanto-Budo ĉe la Librofoiro

Ekde la 10ª ĝis la 21ª de februaro 2011 okazis en Havano Internacia Librofoiro, organizita de la Ministro pri Kulturo de la Kuba Respubliko, gvidata de la Instituto pri libroj, kiu havas oficialajn rilaton kun Kuba Esperanto-Asocio (KEA).

De tiu scenejo, denove, profitis KEA por disvastigi praktike Esperanton, eksponante diversajn literaturaĵojn, por ke miloj da vizitantoj el diversaj partoj de la mondo, kiuj kutime partoprenas en ĉi grandega libra festo, ankaŭ eksciu, ke Esperanto havas vastan literaturon, sed ĉefa kaj plej grava celo estis informi la publikon, ke Esperanto daŭre ekzistas.



Ĉiutage deĵoris tie la kuba esperantistaro kaj ĉiu vizitanto ricevis diversajn propagandilojn pri nia lingvo kaj pri diversaj internaciaj esperantaj eventoj, kiel nia laste organizita UK.

Tie ĝueblis ankaŭ renkontiĝo kun esperantistoj, kiuj jam delonge ne plu rilatiĝas kun la asocio kaj tiu denova kontaktiĝo transdonis energion por reveni al la movado, kiel, ekzemple, d-ino Marta Elena García Vega, kiu sin proponis por reorganizi la movadon en Orienta Havano, la municipo iom for de la centro. Ne mankis partopreno de gejunuloj deĵorpretaj, kio estas grava parto de KEA-strategio, por prepari la estontecon de la kuba esperantistaro.

Grandan helpon ni ricevis flanke de Vilhelmo Lutermano, kiu ankaŭ ĉeestis kaj kontribuis al la literatura pliriĉigo per kubaj libroj, de li mem tradukitaj esperanten.

La personoj, interesiĝintaj pri Esperanto dum sia ĉeesto en la evento, ricevis aparte detalajn informojn pri la eblo lerni la lingvon kaj kontakti la KEA-reprezentantojn.

La librofoiro estis vizitita, dum dek tagoj, de ĉ. 450 mil personoj kaj estis venditaj proksimume 900 mil libroj.

Manuel O. Rodríguez Rábago, Havano, Kubo

"Popolo, kiu ne kuraĝas moki pri si mem, ne estas matura" - ŝatis diri Raymond Schwartz (1894-1973).

Marta Programo

1 mardo	**17h30** - Posttagmeza kurso
4 vendredo	**20h00** - Esperanto-krucvortoj
8 mardo	**18h00** - Posttagmeza kurso
11 vendredo	**20h00** - Bonvenkunveno kun Antonio de Salvo
14 lundo	14h40 - Esperanto ĉe Alirprogramoj de RADIO UNO
15 mardo	**18h30** - Salono Beethoven - Vojaĝoj en Mongolio - prezentas Roberto Ive
18 vendredo	**20h00** - Bildoj el la mondo
22 mardo	**18h00** - Posttagmeza kurso
25 vendredo	**20h00** - Muziko kun Manuel
29 mardo	**18h00** - Posttagmeza kurso

Aprila Programo

1 vendredo	**20h00** - Survoje al Ĉinio (per bildoj kaj vortoj)
5 mardo	**18h00** - Posttagmeza kurso
8 vendredo	**20h00** - Surpriza vespero kun Anita
12 mardo	**18h00** - Posttagmeza konversacio
15 vendredo	**20h00** - Surpriza vespero kun Anita
19 mardo	**18h00** - Posttagmeza konversacio
22 vendredo	**20h00** - Surpriza vespero kun Anita
26 mardo	**18h00** - Posttagmeza konversacio
29 vendredo	**20h00** - Rakontoj pri Ĉinio

Divenludo de Viglo

La solvo aperos en venonta Bulteno: inter la solvontoj, ni lotumos interesan premion.



Stranga interparolanto

Ofte difinita fina aŭ halta, estas tiu etulo ĉiam postulanta en paroladojn eniri por konkludi rapide, ja kelkfoje eĉ dirante: "Sufiĉe, ĉesu!"

verkisto de la fame konataj Esperanto-Ŝlosiloj) en Londono, sekve de la apero de la spesmila monosistemo. Tuj li aktiviĝis por ĝia praktika aplikado en la bankoservo kaj jam en septembro 1908 li aperigis provizoran regularon kaj malfermis kelkajn kontojn. Post kvinmonata elprovado, la esperantista ĉekbanko estis praktike aranĝita. Ĝia celo estis unue faciligi la pagojn inter la diversnaciaj esperantistoj kaj komercistoj kaj, due, prepari la vojon por ĝenerala akcepto kaj enkonduko de internacia monunuo.
Laŭ Enciklopedio de Esperanto la transpago estis "plej oportuna kaj malkara". Je la 30ª de aprilo 1914 ĝi havis 730 kontulojn en 320 urboj, 43 landoj.
Bedaŭrinde post morto de la fondinto la banko likvidiĝis.

Fontoj: 'Enciklopedio de Esperanto' (1933); Vikipedio; 'Esperanto-Mono' de Hans Jankowski

Atentigo. Aprile kaj maj-komence, via redaktanto forestos, tial via 'amata' TEA-Bulteno aperos kun ioma malfruo. Por ke vi pardonu tiun mian maldiligentecon, jam ekde nun mi promesas iun eksterordinare interesan kaj informoriĉan bultenan ekzempleron. *Kore via forvojaĝonta redaktanto*

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo: Via del Coroneo 15 - Trieste - marde 17-19; vendrede 19-21
Tel: (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it
Grupa ttt-ejo://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina
Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349

Uno per tutti … cinque per mille!

AIUTACI AD AIUTARE L'ESPERANTO

Il 5 per mille dell'IRPEF all'Associazione Esperantista Triestina
senza costi per voi!

Anche quest'anno i contribuenti, grazie alle disposizioni inserite nella Legge Finanziaria 2006, possono destinare il **5 per mille dell'imposta stessa** a sostegno di determinate iniziative di rilevanza sociale.

La nostra Associazione è fra gli enti che possono ricevere questo contributo.

Come fare ?
È molto semplice: basta indicare il numero di codice fiscale dell'Associazione nell'apposita casella prevista per la destinazione di questo contributo, nel momento in cui effettuerete la dichiarazione dei redditi per il 2010 (con il mod. Unico, il 730, il CUD, ecc). Il codice fiscale da indicare è il seguente:

90012340320

Invita perciò i tuoi amici, parenti, conoscenti, colleghi di lavoro, e tutte le persone che in qualche modo si dichiarano favorevoli all'esperanto, a scrivere nell'apposito spazio previsto nella dichiarazione dei redditi il

numero di codice fiscale dell'Associazione Esperantista Triestina

Ringraziando per l'appoggio che ci potrai dare, porgiamo cordiali saluti.

ASSOCIAZIONE ESPERANTISTA TRIESTINA
Il Presidente
(Edvige Ackermann)

Associazione Esperantista Triestina C.F. 90012340320
Associazione Esperantista Triestina C.F. 90012340320
Associazione Esperantista Triestina C.F. 90012340320
Associazione Esperantista Triestina C.F. 90012340320
Associazione Esperantista Triestina C.F. 90012340320
Associazione Esperantista Triestina C.F. 90012340320
Associazione Esperantista Triestina C.F. 90012340320
Associazione Esperantista Triestina C.F. 90012340320
Associazione Esperantista Triestina C.F. 90012340320
Associazione Esperantista Triestina C.F. 90012340320